

**Genta Esperanto-Klubo**

**“ La Progreso ”**



**REGULARO**



---

Presejo Fl. PRIMO, (Kunststr.) Mto Sta Amando

# Regularo

de la GENTA ESPERANTO - KLUBO

“ LA PROGRESO „

Antaŭa Rimarko : Ĉar la du seksoj havas la samajn rajtojn, la vira formo de vorto estas ĉie anstataŭigebla per la virina.

## I. FONDIĜO, CELOJ KAJ DIVERSAĴOJ

1. — Fondiĝis en Gento, la 10an de Oktobro 1915, klubo esperantista sub la nomo « LA PROGRESO » kaj devizo « UNU HOMARO, UNU HELPLINGVO »

2. — La Klubo celas :

1. Varbadi adeptojn por la Zamenhofa internacia Helplingvo « Esperanto ».
2. Ebligi al siaj gemembroj perfektigon pri tiu lingvo.

3. — La sidejo estas starigita en Gento kaj la kunvenejoj estas elektataj de la komitato ; ĉiuj decidoj por esti decidigaj devas okazi en la sidejo. - La daŭrado de la klubo estas nedifinita.

4. — La societa respondeco estas difinita ĝis atingo de siaj posedaĵoj.

5. — La societa jaro komenciĝas la 1an de Septembro

6 — La klubo devas esti aniĝinta al la « Belga Ligo Esperantista » kaj al la « Federacio de la Esperantistaj grupoj de Orienta Flandrujo. »

7. — La Klubo estas tute senpartia. Ĉiu diskuto pri religiaj kaj politikaj demandoj estas malpermesata.

8 — Specialaj sekcioj estas starigeblaj en la mezo de la klubo post aprobo de la komitato. Ili havas se necese specialajn regularojn kaj estraron kiuj devas ankaŭ esti aprobataj de la klubo-komitato.

## II. GEMEMBROJ.

9. — La klubo konsistas el : PROTEKTANTAJ - kaj ordinaraj Gemembroj.

10. — La klubo povas nomi interkonsente kun ili influajn personojn, kiel honorprezidantoj ; ĉi-tiuj rajtas ricevi krom tiu-ĉi regularo, ĉiujare kopion de la ĝenerala raporto.

## ALIĜOJ.

11. — Ĉiu persono kiu deziras aliĝi al la klubo devas esti skribe prezentata al la komitato de almenaŭ unu grupano ; kiu, tion farante, deklaras sin responde pri la indeco de la prezentato ; la demando devas enhavi la nomon, profesion kaj adreson de la prezentato kaj esti subskribata de la prezentanto(j) kaj de la prezentato.

Antaŭ akcepto, sciigo pri la prezento estos farata aŭde en la sidejo dum almenaŭ 8 tagoj ; ĉiu ano estas petata konigi al komitatano siajn eventualajn rimarkojn pri la prezentito.

12. — La akcepto okazas en la sekvanta komitata kunveno, per sekreta voĉdono. La komitato ĉiam rajtas ne akcepti prezentitajn personojn, la motivo restas sekreta.

## KOTIZAĴOJ.

13. — La gemembroj pagas ĉiujare je prezento de kvitanco (membrokarto).

La Protektantaj : 4 Sm - 10 fr. minimume.

La Ordinaraĵoj : 1.20 Sm - 3 fr. minimume.

Se membro pagas pli ol la minimumo, la sumo estas montrata post lia nomo sur la membrolisto.

14. — A) Kiel ordinaraĵoj membroj, gefamilianoj loĝantaj en sama domo pagas :

La unua : Plenan kotizaĵon.

La aliaj : po duonan kotizaĵon, se ili esprimas tiun deziron.

B) Nova membro pagas kotizaĵon kalkulita je dekduonoj de la monato de sia akcepto, enkalkulite ĝis la fino de la societa jaro ; tamen, se li estas sekva aŭ sekvinta pagan kurson kies enskribprezo atingas la plenan kotizaĵon, li ricevos senpage sian membrokarton por la sama jaro.

## RAJTOJ kaj DEVOJ.

15. — Ĉiu protektanta aŭ ordinara membro rajtas :

1° Ricevi ekzempleron de ĉi-tiu regularo,

2° Ĉeesti ĉiujn klubajn kunvenojn, festojn, ekskursojn, k. t. p.

3° Pruntepreni librojn el la biblioteko.

4° Sekvi senpage kiun ajn kurson starigita de la klubo.

5° Demandi parole aŭ skribe al la komitato ĉion ajn pri Esperanto.

16. — Siaparto, ĉiu ordinara membro sin admonas :

- 1<sup>o</sup> Koniĝi kaj ĉiam respekti ĉi-tiun regularon,
- 2<sup>o</sup> Kunlabori por la prospero de la klubo kaj de Esperanto.
- 3<sup>o</sup> Konduti ĉiam konvene kaj obei al admono de komitatano; se li opinias ke la admono ne estas justa, li rajtas plendi poste al la komitato.
- 4<sup>o</sup> Ĉiam memori ke amuzo ne estas celo de la klubo sed rimedo per atingi la celojn; flirtó kaj danco estas severe malpermesataj.
- 5<sup>o</sup> Porti la verdan stelon kaj paroli esperante en la klubaj kunvenoj.

### EKSIĜOJ kaj EKSIĜOJ.

17. — Ĉiu ano kiu deziras aksiĝi konigas tion skribe al la sekretario. Rifuzo de la jara kvitanco post la dua prezento estas ankaŭ pruvo de tia deziro.

18. — Membro kiu vole kaj obstine malhelpas la interesojn de la klubo aŭ kiu pro sia konduto iĝas nedezirinda grupano estas eksigebla post konsento de la plimulto de la komitatanoj, li estas petata skribe aksiĝi aŭ sin defendi en la komitata kunveno decidonta pri la eksigo.

La eksigito rajtas apelacii en la jara ĝenerala kunveno; la eksigo estas konfirmata, se la 2/3 de la ĉeestantoj ĝin akceptas.

Komitatano povas nur esti eksigata en speciala ĝenerala kunveno, se la 2/3 de la ĉeestantoj voĉdonas por la eksigo.

19. — Aksiĝinto aŭ eksigito perdas ĉian rajton en la klubo kaj ne povas postuli redonon de kotizaĵo aŭ donacoj.

### III. KOMITATO.

20. — La komitato konsistas el 8 membroj, nome :

- Unu Prezidanto ;
- 1 Vicprezidanto ;
- 1 Sekretario ;
- 1 Kasisto ;
- 1 Bibliotekisto ;
- 3 Helpkomitatanoj.

La komitatanoj eksiĝas ĉiujare en la ĝenerala kunveno. Ili estas reelekteblaj. La elekto okazas laŭ la reguloj formulitaj en la parto V de ĉi-tiu regularo.

21. — La komitato administras kaj riprezentas la klubon ; ĝi laboras por ĝia prospero per ĉia rimedo konforma al la regularo ; ĝi decidas pri ĉio ajn kio ne estas formulita en ĉi-tiu regularo. Pri la funkciado de la komitato kaj la devoj kaj rajtoj de la komitatanoj ekzistas speciala regularo, kiu estas en la biblioteko je la dispono de ĉiu membro

La komitatajn kunvenojn rajtas ĉeesti nur la ĝekomitatanoj.

### IV MONRIMEDOJ, KURSOJ, BIBLIOTEKO

22. — Pri tiuj aĵoj ekzistas specialaj regularoj. La regularoj pri la monrimedoj kaj pri la kursoj estas en la biblioteko je la dispono de ĉiu ano ; tiu pri la biblioteko estas afiŝita ĉe la bibliotekŝranko.

### V. ĜENERALAJ KUNVENOJ.

23. — La jara ĝenerala kunveno okazas en la sidejo la unuan aŭ duan dimanĉon de Septembro je la 10a matene. La alvoko devas esti sendata al ĉiu pro-

sektanta kaj ordinara membro almenaŭ 8 tagojn antaŭ la kunveno kaj enhavi la plenan tagordon. ĉi-tiu enhavos almenaŭ :

- 1<sup>o</sup> Lego de la ĝenerala kaj biblioteka raportoj,
- 2<sup>o</sup> Lego kaj aprobo de la kasista raporto,
- 3<sup>o</sup> Eksiĝo de la malnova komitato kaj elekto de la nova

La kunveno estas prezidata de la eksiganta prezidanto kaj la raporto pri ĝi estos farata de la eksiganta sekretario. Rajtas voĉdoni ĉiu ano, protektanta aŭ ordinara posedanta la kvitancon (membrokarto) por la finiĝinta societa jaro de almenaŭ 3 monatoj.

La kunveno decidas per plimulto da voĉoj, escepte pri la aferoj montrataj en la reguloj 18 kaj 27. Okaze de samaj nombroj, la voĉo de la prezidanto decidigas.

24. — La novaj kandidatoj je komitataneco devas esti prezentataj skribe, ĉu de la kandidatoj mem, ĉu de aliaj membroj kun skriba konsento de la kandidatoj. Almenaŭ 4 novaj kandidatoj devas esti prezentataj.

Prezenteblaj estas ĉiu plenaĝa ordinara membro kiu posedas ateston pri kapableco aŭ parolas sufiĉe lerte kaj senerare la Esperantan lingvon. La elekto okazas per sekreta voĉdono, sen difino de la funkcioj; ĉiu ano ricevas por tio liston de la kandidatoj kaj forstrekas la ne deziratojn, ĉiel almenaŭ unu.

La kalkulo de la voĉoj estas farata de nekandidato kun kontrolo de la prezidanto. Elektitaj estas la kandidatoj kiuj atingas la plej grandan voĉnombron, kaj almenaŭ la  $1/2$  de la voĉoj, la aĝo decidigas. La neelektitoj, kiuj atingis la  $1/2$  el la voĉoj, anstataŭos eventuale eksigintajn komitatanojn.

Se ne sufiĉe da kandidatoj estas elektitaj, okazos dua kompletiga voĉdono en la sama kunveno. Se tio ankaŭ ne sufiĉas, la komitato mem kompletigos sin en sia unua kunsido.

25. — Speciala ĝenerala kunveno okazas kiam la duono el la komitatanoj aŭ la kvarono el la gemembroj demandas tion.

Ĝi estos regata de la samaj reguloj kiel la ĵara ĝenerala kunveno.

## VI. MALFONDIĜO

26. — La klubo ekzistas tiel longtempe ke 12 aktivaj gemembroj restas. ĉe la malfondiĝo, ĉiuj monrimedoj kaj posedaĵoj, krom la biblioteko, iĝos propraĵo de la « Belga Ligo Esperantista » aŭ se necese, de alia nacia organizaĵo ; la biblioteko iĝos propraĵo de la « Federacio de la Esperantistaj grupoj de orienta Flandrujo » aŭ se necese de alia Genta Esperanta organizaĵo aŭ publika biblioteko.

## VII. ŜANĜOJ AL LA REGULARO.

27. — Ŝanĝoj al ĉi-tiu regularo kaj al la kompletiga regularo pri la komitato kaj la monrimedoj povas nur esti farataj se la  $\frac{3}{4}$  de la komitato ilin akceptas ; tamen la ŝanĝoj estas nur definitivaj se, en ĝenerala kunveno la  $\frac{3}{4}$  de la ĉeestantoj ilin akceptas.

28. — La regulo pri la malfondiĝo kaj ĉi-tiu nur povas esti ŝanĝataj, se, en ĝenerala kunveno, almenaŭ 25 membroj akceptis la ŝanĝon.